



Oficiala Organo
de

Flandra

Ligo

Esperantista



JARA ABONPREZO: 20 fr. — Eksterlando: 5 belgoj.

Por membroj de « Flandra Ligo Esperantista » senpaga.

Flandra Esperanto - Instituto

Vereeniging zonder Winstbejag

Magdalenastraat, 29, KORTRIJK

Poŝtĉekkonto: F. E. I. 3268.51 — Telefono: 1654

EL LA PREZARO:

Pallietter — F. Timmermans	Fr. 45.— bind.
Leono de Flandrujo — Conscience	55.— »
La Viro el Francujo — Ivans	29.— »
Per Balono al la Poluso — Andrée	65.— »
Viktimoj — J. Baghy	30.— »
Verdaj Donkiĥotoj — J. Baghy	20.— »
Tra la Labirinto de la Gramatiko	45.— »
Elektitaj Noveloj — Lode Baekelmans	7,50 broŝ.
Amo kaj Poezio — Jan Van Schoor	10.— »
La Du Amatinoj — de Musset	7,50 »
La Junulino el Stormyr — Selma Lagerlöf	12.— »
La Mono de S-ro Arne — Selma Lagerlöf	12.— »
La Infanoj de Betlehem — Selma Lagerlöf	5.— »
Dialogoj kaj Komeditoj — E. Dahl	3,75 »
Barbro kaj Eriko — Letera romaneto	4.— »
La Stranga Butiko — R. Schwartz	18.— »
Gaja Lernolibro (ilustrita)	15.— »
Examenopgaven	12.— »
Leerboek Dirksen — 2 deelen	18.— »
Blinda Rozo — H. Conscience	4.— »
Het Esperanto in 10 lessen — Witterijck	5.— »
Woordenboekje Blok (1890 stamwoorden)	2.— »
Schidlof Zakwoordenboek	30.— »
Flandra Esper. 2-a, 3-a, 4-a kaj 5-a jarkolektoj (kompl.)	15.— »
Flandra Esperantisto, 1-a jarkolekto (sen la n ^o 1)	10.— »
Fotografajo D-ro Zamenhof, bela poŝtkarto	2.— »

INSIGNOJ: Malgranda verda stelo: 2.00 fr.

Verda stelo, sur blanka fono: 2.50 fr.

Verda stelo, kun kruco: 2.50 fr.

Granda verda stelo, kun blanka rando: 4.50 fr.

Glumarkoj, en lingvo Flandra aŭ Esperanta: folio de 8 diversaj markoj kostas po 5.— fr. por 10 folioj.

Krajono kun surpriso « Esperanto »: 1.— fr.

Leterpapero kaj kovertoj por 20 po 3.— fr.

Poŝtkartoj: por 10 po 1 f₄

Flandra Esperantisto



Oficiala Organo de Flandra Ligo Esperantista
Aperas ĉiumonate

Ĉefredaktoro:
C. Schroeyers
Transvaalstraat, 10
Berchem
Antwerpen



Administranto:
Gerard Debrouwere
Magdalenastr. 29
Kortrijk
Tel.: 1654

Jara abonprezo: 20 frankoj. — Eksterlando: 5 belgoj
Por membroj de « Flandra Ligo Esperantista » senpaga.
Poŝtĉeko: 2321.50 de F. L. E. Kortrijk.

Konstantaj kunlaborantoj: L. CALLOENS, G. DE
BROUWERE, L. v. d. POEL, E. CORTVRIENDT,
A. LODEMA kaj aliaj.

FELIĜAN NOVJARON AL ĈIUJ!

Okaze de la nova jaro 1936, la Estraro de **Flandra Ligo Esperantista**, same kiel la Redakcio de ĝia revuo **Flandra Esperantisto**, deziras al ĉiuj siaj membroj, al ĉiuj siaj legantoj, kaj al la tutmonda samideanaro, ĉion dezireblan: fortan sanon, longan vivon, kaj prosperon en iliaj entreprenoj!

Al nia Ligo kaj al nia Revuo, ni deziras ankaŭ longan ekzistadon ne tro penan.

Por ke tiu-ci lasta deziro efektiviĝu, ni esperas, ke la jaro 1936 alportu al ĉiuj membroj novan kuragon, novan energion, novan oferejon kaj elkoran interesigon por nia kara Zamenhofa lingvo kaj ĝia interna ideo!

Flandra Ligo Esperantista.
Flandra Esperantisto.

Flandra Ligo Esperantista

^A**Generala kunveno en Gent, 8 Decembro 1935.**

La kunveno malfermas je la 10 1/2 h., sub prezido de S-ro Rainson. Ceestas delegitoj el Antwerpen, Astene, Brugge, Brussel, Gent, Hamme, Kortrijk, Roeselare ; ankaŭ kiel gasto S-ro Telling el Rotterdam.

La kunsido aprobas la raporton de la antaŭa kunveno.

La prezidanto proponas komenci per punkto 4 de la tagordo, ĉar kelkaj personoj ne povas resti ĝis la fino.

S-ro De Boes raportas pri la skribaĵoj, kiujn li ricevis koncerne la aliĝon al TEL. Konkludi el ili estas malfacile, ĉar neniu sin prononcis nete por aŭ kontraŭ ; legi la respondojn entute ne eble estas, ĉar kelkaj leteroj ampleksas pli ol 3 paĝojn. Nur « Pioniro » el Aalst konsentis senrezerve. « Flandrema Grupo » el Antwerpen rekomendas fari lastfojan demandon el UEA kaj, je nova rifuzo, konsentus aliĝi al nova internacia asocio, kie partoprenus almenaŭ 3 naciaj societoj.

Al demandoj por klarigoj, S-ro Telling respondas ke LEEN kaj TEL ne havas rilatojn. La TEL-afero ne jam estas tute klara, ne jam estas plene organizita asocio. Oni ĝin rigardu kiel rulantana neĝbulon; ĝi enrulas unue Belgujon, poste laŭ cirkonstancoj Ĉeĥoslovakujon, Germanujon, Estonujon kaj ankoraŭ aliajn.

TEL ne signifas, almenaŭ en ĉi tiu momento, stari kontraŭ UEA; ĝi celas devigi la Universalan Esp. Asocion turni la direktilon.

TEL unue venas al FLE, ĉar ni vivas en sama lingvoteritorio; en tio ĝi sekvas la ekzemplon de la Laborista Federacio, kiu ankaŭ ampleksas Nederlando kaj Belgujon.

La interkonsento de Kolonjo diras ke en ĉiu lando staras nur unu nacia organizaĵo. Tio estas bona en lando kun unu asocio : en la aliaj landoj logike la pli forta asocio devus esti konsiderata kiel la nacia, sed UEA diras alie.

TEL nun volas formi grandan ligan por peti aliĝon al UEA. Se UEA daŭre rifuzos, TEL puŝos al kreo de nova organizaĵo kun societoj el ĉiuj landoj, kiuj ne apartenas al UEA.

S-ro Telling studis Esperanton ne por naciaj aferoj sed por internaciaj kaj tial serĉas kontakton kun la eksterlando.

La prezidanto S-ro Rainson diras, ke el la deklaroj de S-ro Telling li resume komprenas : TEL volas fariĝi granda forta asocio por devigi UEA-n akcepti ĝin. Se UEA rifuzas, TEL konstruos novan asocion kun helpo de aliaj ligoj.

Estas nun jam de jaroj ke FLE klopodas eniri la internacian organizaĵon kaj tio riskas eterne daŭri... En niaj rangoj aŭdiĝas voĉoj por kaj kontraŭ UEA. La estraro deziras fini kun tiuj diskutadoj kaj demandas ke la grupoj senrezerve diru, per jes aŭ ne, ĉu FLE deziras aliĝi al la internacia organizaĵo ; poste ni ekzamenos al kiu asocio, ĉu UEA aŭ TEL.

En la debato ankoraŭ intervenas F.-no Terryn kaj S-ro De Boes. S-ro Roose akcentas, ke inter Nederlando kaj Belgujo ekzistas

sufiĉe granda diferenco. En Belgujo vivas 2 popoloj; ni volas esti la reprezentantoj de la Flandra. Certa estas ke FLE kondukis al Esperanto multajn personojn ne aliĝontaj al Belga societo; ĉu ni gajnus membrojn aliĝante al TEL? Utilas ankaŭ havi oportunecon vidpunkton.

En Kolonjo estis akceptita la principo: grupo — asocio — internacio. Ĉu UEA pravas rifuzante TEL? Ĉu prave aŭ neprave stariĝas novaj ligoj apud la ekzistantaj naciaj? Jen ankaŭ punktoj konsiderindaj.

S-ro Rainson ree insistas por scii, ĉu jes aŭ ne la estraro devas daŭrigi la traktadojn por aliĝi al UEA, alie ĝi ne povas agi nek por, nek kontraŭ TEL aŭ UEA.

S-ro Cortvriendt opinias ke estas antaŭtempa laboro, ĉar verŝajne FLE nun ne kapablos plenumi le financajn postulojn.

* * *

F-no Terryn informas pri la preparoj por la kongreso en Gent. Delegacio vizitos profesoron Daels, membro de FLE, por prezenti al li la honorprezidantecon de la kongreso.

Intence de multaj alilandanoj kiuj sin anoncis, okazos por la unua fojo ankaŭ Protestantanta diservo.

La prezidanto pritraktas kune la punktojn propagando kaj Csehkurso, kaj informas pri la efiko de persone farita laboro.

La lasta kunveno decidis prezenti al S-ro Van den Dooren la vicprezidantecon; bedaŭrinde li ne povas akcepti.

Estas prezentitaj 2 novaj kandidatoj: S-anoj Van Peel el Antwerpen kaj Cortvriendt el Brussel. S-ro Schroevers diras ke Van Peel ankaŭ ne povos akcepti kaj proponas S-ron Cortvriendt; ĉi-lasta deklaras, ke li jesos nur post definitiva rifuzo de S-ro Van Peel.

La prezidanto komunikas leteron ricevitan el Nederlando de la « Dietsch-Nationale Esperanto-Beweging ». La kunveno aprobas la respondon, kiun sendis la sekretario.

S-ro Braekevelt, nome de la grupo Roeselare, protestas kontraŭ la represo en F. E. de poeziaĵo, kiun li taksas malmorala. La ĉefredaktoro zorgos por ke tiaspecaj literaturaĵoj forrestu el F. E.


S-ro Schroevers diras ke urĝe necesas ke la redakcia oficejo disponu pri skribmaŝino; eraroj ofte okazas en la kompostado pro ne sufiĉe bone legebla teksto, kiun la presisto nun postulas maŝinskribita.

Por akiri la bezonatan monon, alvoko estas farita al la ligoj. S-ro De Martelaere proponas organizon de tombolo: li desegnas senpage la portreton de la gajnanto. Same okazis por plenigi la kason de la stenografia asocio. Antaŭ kelkaj jaroj, S-ro De Martelaere pentris portreton de D-ro Zamenhof; grupo el Hago ĝin aĉetis kaj poste donacis al la Internacia Esp. muzeo en Vieno.

* * *

La dato de la venonta ligkunveno aperos en F. E.

La sekretario.



7a Flandra Kongreso Gent

30an KAJ 31an DE MAJO KAJ 1an DE
JUNIO 1936.

Mendojn kaj menseendojn oni bonvolu fari je P. C. 1530-50 je nomo de Ach. De Maertelaere, Proveniersterstraat, 25, Gent. Korespondojn por la organiza komitato oni sendu al la adreso : Raapstraat, 82, Gent.

TRIA KOMUNIKO.

Kotizo : 12 fr-oj.

Glumarkoj trikoloraj estas haveblaj po 6 fr. la 100.

Kun ĉi-tiu bulteno vi ricevas aliĝilon kun ĉiuj klarigoj.

La O. K. ĝentile petas al la gesamideanoj bone legi la rimarkojn kaj priatenti la daton de la *15 a de Majo*. Estas en via propra intereso : se vi plifaciligas al ni la laboron, frue aliĝante, ni des pli bone povos prizorgi vin.

* * *

La lundon okazos ŝipekskurso laŭlonge de la pentrinda « Leie » ĝis la ponto de Deurle. Tie estos ebleco naĝi en la rivero; ĉi tio por la amatoroj. Ebleco por promenadi en la ĉirkaŭaĵo, — ludoj en plena aero. La O. K. zorgos ree esti en Gent, en la proksimeco de la Sta. Petro-Stacidomo, je la 16.30, por ke la personoj, kiuj frue devos forveturi, povu trafi la vagonaron.

Krom la kutima katolika diservo, ankaŭ okazos protestanta, kun Esperanta prediko de Ds. Kerremans, predikanto en Molenbeek.

Gent

LA BELFRIDO.

La Belfrido, iama urba gardistejo kaj sonorilturo, datumas de proksimume, 1300. En ĉi-tiu turo, simbolo de la praa komunuma potenco, oni gardis, depost 1401, la privilegiojn de la urbo.

En la jaro 1325 oni pendigis en la turo la famegan sonorilon « *Roeland* » (elp: Ruland), kies surskribo tekstis : « Deum time — in 't jaer ons Heeren, doe men screef M.CCC. ende XIII, in Sce-« pendom van Willem de Beer ende haere ghesellen, in Wedemaent « (Juni), maecte dese clocke meester Jan Van Ludeke ende meester « Jan van Roosebeke, die gheheeten es Roeland. Als me se luudt, « es 't sturme in 't landt ».

En la jaro 1314, dum la skabeneco de Willem de Beer kaj liaj kunuloj, en la monato Junio, majstroj Jan van Ludeke, kaj Jan van Roosebeke faris ĉi-tiun sonorilon, nomatan Ruland. Kiam ĝi sonoras, estas ventego en la lando.

« Roeland » ankaŭ avertis la civitanojn pri brulado kaj alia mal-feliĉego, vokis ilin al la laboro, aŭ al la batalo en tempo de milit-danĝero. En 1659 la sonorilo frakasiĝis kaj servis kiel fondaĵo ĉe la farado de nova sonorilaro, kies plej granda sonorilo estas nomata laŭ ĝia antaŭulo : « Roeland ».

En 1338 oni lokigis ĉe la kvar anguloj de la kvadrata turo, bildojn de komunumaj militistoj. Unu restis sur sia posteno ĝis en 1876 kaj estas nun en la Muzeo de Ŝtonaĵoj. (St. Bavo abatejo). Depost la renovigo de la Belfrido en 1912, kvar ŝtonaj mezepokaj militistoj ree daŭrigas sian eternan gardadon.




Gent : (de maldekstre al dekstre), malantaŭa fasado de la *Haloj*, *Belfrido*, *Urbdomo*.

Ce la pinto turnas depost 1378, kiel ventmontrilo, orumita kupra drako, kiu, dum tiuj centjaroj, multfoje estas riparita. Kelkaj partoj de la originala drako troviĝas en la Muzeo de la Belfrido.

Gi-tiu Muzeo estas aranĝita en diversaj ejoj de la turo, kies viziton faciligas lifto. La plej suba ejo, kun belega volbo, estas la « *Sekreto* » ; en ĝi oni vidas la keston, en kiu oni gardis la ĉartojn

de la urbo ; plie troviĝas modeloj de turgardistoj ; kaj kopioj de belartajoj, reprezentantaj la « *Roman Infanan Amon* », la subjekto de la frontona figuro de la apuda konstruaĵo, konata kiel « *De Mammelekker* » (la mamsučanto) iama urba malliberejo. En la unua kaj dua etaĝo estas kunigitaj nombro da interesaĵoj, kiuj rilatas la historion de la Belfrido.

Per la lifto oni supreniras al la unua galerio. Suprenirante kelkajn ŝtupojn oni atingas la duan galerion. De sur ambaŭ oni havas belegajn vidojn sur la urbon.



Gent : *Drako* de la Belfrido. Ankaŭ niaj glumarkoj prezentas ĝian bildon.)

Malsuprenirante oni vizitas la ejon de la grandaj sonoriloj; inter ili la nuna « *Roeland* », pezanta 6050 kgr., kaj malfeliĉe krevida, estas provizore ekster uzado. — « *Roeland* » kaj la du aliaj plej grandaj sonoriloj estas kune nomataj la : « *Triumfantoj* ». En la ejo pli sube troviĝas la horloĝo, kiu funkciigas la meĥanikan sonorilan arioludilon, kiu troviĝas en la sonorilarĉambro pli sube kune kun la ĉambreto de la sonorilarludisto, kaj la pendelo kun kvardek-ok sonoriloj.

Ciuj sonoriloj kune funkcias en la sonorilaro kaj trideko da ili estas fanditaj de la tutmonde konata Hemony.

Sonorilar koncertoj okazas sabate je la 9a vespere de meze de Junio ĝis meze de Septembro.

(Laŭ « *Geillustreerde Gids* — *Gent*).

La Sireno

de Pol VARENS.

Kie Teo vidis ŝin la unuan fojon ? Li ne plu memoris ĝin. Sajnis al li, ke li ĉiam estis koninta ŝin, ke ŝi estis la mistera respondo al vivodemando, kiu ekde lia ekzistado ekzistis kun li, disvolviĝis en li.

La unuan fojon ke iliaj rigardoj, pro komuna impulso, kvazaŭ ekpalpis la sentojn, kiujn ili esprimis, ŝi estis promenanta man' en mano kun fraŭlo, sendube ŝia fianĉo. Gajaj ŝajnis tiuj gefianĉoj, sed Teo ne sen miro malkovris melankolian flamon en la okuloj de la fraŭlino. Tiuj okuloj parolis al li pri simpatio, kaj nepripensante la strangecon de tiu sintenado en tiaj cirkonstancoj, senkonscie, senvole liaj okuloj respondis egale simpatie. Li sentis feliĉon en si pro tiu fakto kaj tuj ankaŭ deziron revidi la knabino.

Nur post kelkaj tagoj denove preterpasis hazarde la gefianĉoj kaj pli dolĉa estis la rigardo, dolĉa sed ankaŭ arda : fulmo lin penetranta per beata sentado. Dimanĉomaten, printempa suno invitis al promenado, kaj li decidis sekvi la gejunulojn. Kial ? Kien ? Ĉu li volis disrompi ĉarman idilion ? Ĉu pro egoismo li semus diskordon, dubon, eble ĉagrenon en aliajn korojn ? Sed tiujn demandojn Teo ne faris al si. Interne ĝuante li primiris la elastikan paŝkadencon de la fraŭlino, vere ĉarma pupeto. Tiun-ĉi tagon li sciis kie ŝi loĝis. Sed tiu scio estis fatala por lia animkvieto, tiu scio konstante kaj, de tag' al tago pli insiste kreskigis en li la deziron plie vidi ŝin, por denove esplori la mistikan okulfrapon. Liaj klopodoj sukcesis ; pli detale jam li kaptis ion pri ŝia vivo, kaj ŝi certe jam estis rimarkinta liajn pli ol hazardajn renkontojn. Kiam ŝi ne estis sola, la rigardo tuj iĝis rideto, sed ĉiam trafis lin ree la interna fajro en ĝi. « Flamo, li ridis pri si mem, kiu altiras kiel lampo la muŝojn ! » Li amis... kaj kiamaniere!

Teo, nun tridekjara, antaŭe pretendis ke romantismo kaj idealismo jam preteriris lin... Kiam li meditis pri la vivo, pri la amo, li konkludis ne plu esti kiel antaŭ dek aŭ dekkvin jaroj. La rezono kunlaboris kun la koro. La alpuŝado al unu, al la nura virino, (kiu iam al li ŝajnis la plej alta idealo!), estis anstataŭigita per larĝa emo al serioj da virinoj, kiuj povis plaĉi. Sufiĉis fari elekton el la konvenaj serioj, kaj ankaŭ la mona, la materia afero povis esti pritraktata... Kontraŭe nun denove li amis, senpripense, nekonsultante la rezonon de sia jam rezonplena aĝo. Li sentis ke la nura amo ekzistas.

Tamen, ĉu tiu-ĉi amo ne estis frenezajo, maleblajo ? La fraŭlino havis fianĉon kaj verŝajne baldaŭ edziniĝus...

Intertempe, la deziro konstante kreskis kaj li ĝojis pro tiu kreskado. Dum teatra vespero, dum balo aŭ en aliaj kunvenoj, li sukcesis ŝtele interkonatiĝi kun la alloga knabino, kies rigardo, kiel dolĉa jugo, pezis sur lia vivo, sekvis lin ĉie, estis kunigita al li kvazaŭ elastika ŝnuro, kiu senforta, senvola lin tenis, laŭplaĉe lin altiris. Ili iĝis geamikoj. Kiam, kvazaŭ hazarde, li renkontis ŝin, ili interbabilis pri diversaj temoj, kiuj ambaŭ interesis. Sed pri la granda emo la buŝoj silentis. Nur la okuloj kantis la eternan kanton de l'amo.

Pri la ekzistanta fianĉiĝo ili ne interŝanĝis unu vorton. « Strange ! » ofte Teo murmuris, kiam li vidis la gefianĉojn. « Ĉu ŝi vere amas lin ? Ĉu ŝi amas min ? Kial ? »... Kaj ne sen iu ankora sento li sin demandis tiam : « Ĉu ŝi estus nur Sireno ? Virino kiu altiras la korojn por povi rompi ilin kaj cinike ĝui pro tiu ago ? » Ne, ne ! Tio ne povis esti.

La sopiro al Hermina, (tio estis ŝia nomo), tuj plenigas lian tutan vivon; dumtage, dumnokte eĉ, li nur pensis pri ŝi. Li volus esti kun ŝi en siaj songoj, sed tie per ruza lerteco ŝi ĉiam sin kaŝis. Ju pli grandigis lia amo, ju pli ŝi intimiĝis kun li, des malpli li komprenis la kreskantan simpatian de ŝia amikino, kaj interne li suferis. Malsatigita deziro disŝiris lin, kaj nur vidi la gefianĉojn kune, eklevigis en li ĵaluzon.

Kiam li aludis al ebla rompado de fianĉigo, ŝi ŝajne ne komprenis kaj evitis klaran respondon; kiam fine li buŝe deklaris sian amon, ŝi ne protestis, kaj ŝia rigardo fajris pli ol iam: tiu stranga rigardo en kiu li sinsekve aŭ kunigite malkovris: amon, amikecon, bonecon, gajecon, ŝercemon, malgajecon, melankolion, mistikon, ĉagrenon. Sed la maloftaj, mallongaj okazoj ne ebligis al li preparoli kaj esplori tian tro riĉan programon.

Iam ŝi rakontis al li historion pri antaŭa amo, rompita per la volo de severa, obstina patro, ŝi ne estis sufiĉe forta ribeli kontraŭ la patra ordono. Teo nun opiniis ion kompreni pri ilia stranga amaventuro... La nuna fianĉigado sendube estis pro gepatra incito, kaj la senforta knabino lasis kuntreni sin per la tro forta alfluo.

Tamen, kia paradokso, tiu simpla penso! Ĉu ĝuste en ŝij okuloj li precipe ne legis volon, lumon, fajron? Volo, kiu nuligis lian volon; lumo, kiu, blindigante malebligis al li vidi la realecon; fajro kiu konsumis lin pro deziro, pro malsatego! Ĉar sen volo li estis... ŝi priregis ĉiujn liajn agojn: nur ŝi donis energion, sen ŝi li sentis malkuraĝon kaj estis kvazaŭ aŭtomato, kvazaŭ poliĉinelo, kaj li estus feliĉa se almenaŭ ŝi konsentus lin gvidi, se li nur scius ke ankaŭ ŝi amis lin. Vorte aŭdi tiun parolon el ŝia buŝo estus la vera feliĉo.

« Si certe ridas pri mia freneza agado », li foje pensis.

Sed amika rideto, nur rigardo dum li preterpasis ŝin, sufiĉis por revivigi la esperon.

Monatojn jam daŭris tiu animstato. Ĉiun okazon li kaptis por renkonti, almenaŭ por rigardi ŝin. Tro malmultfoje li povis al ŝi alproksimiĝi, konversacii kun ŝi. Okazis iam dum teatra vespero: Hermina kun ŝia fianĉo ĉeestis la feston, sed pro la fakto ke ili sin trovis sur la balkonetaĝo, li, kiu estis malsupre ne povis alrigardi ŝin. Tiu malŝanco, lia senforto ne povi ĝui de ŝia ĉeestado, havis tiel premantan influon je lia spiritstato, ke estis kvazaŭ ĉio turniĝis antaŭ liaj duonfermitaj okuloj; la scenejo, la salono en malhela lumo al li ŝajnis ĥoaso sendifina, kaj dum tiu revo, li preskaŭ laŭte ekkriis ŝian nomon.

« Tio ne povas daŭri », li diris al si mem. « Se mia volo ne venkas, mi malsaniĝos, freneziĝos. Se Hermina ne povas rompi, tiam mi devas rompi... »

Sed ĝuste la volo ankaŭ al li mankis. La Sirenaj okuloj restis nerezisteblaj.

Tamen pli granda malespero lin atendis.

Kvankam la knabino ĉiam amika restis, li klare rimarkis ke la lastajn tagojn ŝi evitis laŭstrate akompani lin. Kontraŭe estis dum tiuj samaj tagoj ke li akiris ne-dubon-lasantan certecon pri ŝia nekomprenebla amo.

Iun vesperon li sukcesis atingi ŝin en malluma angulo, ekster la urbo. Tie-ĉi ŝi ne tiel timis restadi kun li. Tamen subite li enbrakigis ŝin kaj ekstaze kisis ŝian buŝon... Ho! dolĉa sensacio en tiu momento !... Dum kiom longa tempo li ja fervoris al tiu venko ?... Ŝi ne protestis, nur ridetis amike, fajre, kiel ĉiam. Tamen tuj nun ŝi foriris.

— Mia kara Hermina, flustretis li, ne pesante ke tiu nura kiso povis esti adiaŭo.

La sekvantajn tagojn, kvazaŭ nenio estis okazinta, ŝi salutis lin amike, sed li klare rimarkis ke la rigardo estis pli sentima, pli intima. Li klopodis haltigi ŝin, sed ŝi rifuzis afable : « mi ne havas tempon... »

Trifoje ripetigis tiu malgranda dramo. Sed la trian fojon Teo kunkuris kun Hermina kaj angorvoĉe demandis klarigojn pri tiu stranga, nekomprenebla sintenado... Ĉu estis pro... la kiso ?

« Ne, ne », ŝi rapide respondis.

Sed hejme oni estis protestinta kontraŭ la renkontoj kun li. Iu estis rimarkinta iliajn kunestadetojn kaj estis koniginta tion al la patro, kaj ŝi vere timis novajn malfacilaĵojn.

Denove Teo komparis la senvolan agadon kun la fajre alloga rigardo. Li akre suferis pro tiu disigo, ĉar ne plu sufiĉis al li eta rideto, ama rigardo. Kaj ankaŭ pli vigle lin altiris la mistera knabino, pli peza iĝis la ĉeno, kiu kiel sklavo katenis lin al la amo. Bruegis en lia kapo. Senripoza estis la tago, sendorma la nokto....

Tagoj pasis kaj nun li ne plu sukcesis vidi ŝin, eĉ ne dum momento, eĉ ne kun ŝia fianĉo.

Kiel somnambulo li vagadis en la ĉirkaŭaĵo de ŝia hejmo. Kiel Ahasvero vespere li ŝoviĝis tra la malluma bulvardo aŭ haltis revante, la rigardo fikse en la direkto de la domfenestroj, de la pordo.

Jam dum pli ol unu semajno li ne vidis ŝin ? Ĉu ŝi do estis kaptita hejme kiel en malliberejo ? Ĉu eble malsana ?

Malespere li avidis al ŝi. Li ne povis rezisti al la interna alpuŝo kuri al la sama loko, ĉiufoje kiam la ĉiutaga laboro kaj vivo tion permesis. Nenio alia ekzistis por li. Ekde kiam la vespero etendis sian sorĉan stelmantelon super la aŭtunan atmosferon, li staris sur la bulvardo, kvazaŭ bildo, observante la pordon, malantaŭ kiu la dolĉulino restadis. Malgraŭ ĉio, freneza espero restis en li.

Maloftaj personoj pasis. Blue kiel lunlumo flagris tie kaj tie la straf lanternoj. Radioj el aŭtomobilaj reflektiloj fantomis verde, flave, helblanke inter la nigraj arboj, elradiis sur la ŝosea asfalto meze de la bulvardo... Sed nenion Teo rimarkis, nenion li sentis. Nur fikse li rigardis, rigardis...

Subite en la domkoridoro eklumiĝis. Malantaŭ la pordo, tra la netrasidebla vitro moviĝis silueto. Forte, freneze batis la koro de Teo... Se estus ŝi ?...

La pordo malfermiĝis... Meze de la lumo aperis blankvestita knabino...

— « Herminal » kriis la junulo.

Avido, vigleco revivis en li... Altirate li antaŭen marŝis tra la asfalta ŝoseo. Li devis vidi ŝin de proksime, li volis ekkrii la deziron, kiu forbrulas lin, la malespero kiu mortigas lin...

Sed lin rapide ekblindigis reflektilo. Klaksono grincis panike...
Ve-akra krio resonis... Bremsa krakis...

Jen Teo renversita kontraŭ la asfalto. La rado pasas super la
korpo de la nesingarda fraŭlo.

Dolorĝemante Hermina alrapidis; ŝi forgesas la malpermeson
de la patro ; ŝi ne plu pensas pri la fianĉo... Malespere ŝi falis
flanke de la vundito, plorante, kriante. Ŝi ektenas la sangan kapon
inter la manoj.

— Teo!... Teo!... Estas la unua fojo ke ŝi alparolis lin per la
nomo.

Sed ŝajn morta la junulo kuŝas kun fermitaj okuloj. La kondu-
kisto kaj la aŭtomobilvojaĝantoj tuj demandas adreson de kura-
cisto. La knabino preskaŭ ne povas elparoli unu vorton... Gemante
ŝi ĉiam tenadas la kapon de sia amiko.

— Teo...

Malrapide, nur iomete la okuloj malfermiĝas kaj iu neklarige-
bla ekstazo kuŝas en la mortantaj okuloj...

La buŝo malfacile moviĝas kaj la knabino aŭdas flustraŭ voĉon:

— « Hermina... Ĉu vi do amas min... Hermina... »

— « Jam delonge, mia knabo, ŝi ploretas... Mi ĉiam restis
la senvola knabino, kiu ne kuraĝis ribeli kontraŭ gepatra ordono...
Fatale mi iris mian vojon... Ho, Teo... Teo.

La okuloj jam fermiĝas denove. Nenio plu moviĝas.

— Ho, Dio! Dio! ĝemas la knabino...

Jam alkuras kuracisto, sed li nur povis konstati la mortigon.

La « Sireno », ne, la malforta knabino svenis, kaj kvazaŭ sen-
viva oni devis alporti ŝin en la hejmon, dum la aŭtomobilò trans-
portis la kadavron de Teo al la urba mortintejo.

Por nia propra skribmasino.

Poes 5 fr. Moeder 20 fr. Tante Bel 20 fr. Ch. Stobbaerts 5 fr.
Jeva 50 fr. Naĉjo 6 fr. Rosette kaj José 10 fr. J. Van Geel 5 fr.
J. Telling 20 fr. Fraŭlino Joukes 5 fr.

Subteno por la revuo.

G. Debrouwere 10.-- fr. Fraŭlino Joukes 5 fr.

KURSGVIDANTOJ !!!

Vi deziras por viaj lernantoj malkaran, praktikan esp. lego- kaj
lernolibron ?

Mendu tuj la unuan, binditan Jarkolekton de :

« LA JUNA VIVO »

200-paĝa libro en arta kovrilo

La prezo estas nur : 15 B. fr. (Mendebla ĉe Flandra Esperantisto)
Grupoj ricevas rabaton !

Petu senpagan specimenon de « La Juna Vivo » !

(Red. : West-Graftdyk, N. H., Nederlando).

VIZITO V. T. B. (VLAAMSCHE TOERISTENBOND).

Sabaton, la 16an de novembro la V. T. B. invitis nin por viziti la konatan farunmuelejon VAN DER STUCKEN, staranta en la Damkvartalo (Antwerpen). Kvardekope la gepartoprenantoj respondis al ĉi-tiu invito kaj ili baldaŭ kunvenis en la oficejo de la direktoro. Bonvoleme, li donis klarigojn pri ĉi-tiu vasta institucio, kiu jam ekzistas sesdek jarojn kaj detruigis antaŭ kvardek jaroj de brulfajro. Oni rekonstruis la fabrikejon kaj adaptigis ĝin kiom eble plej al la modernigo, pro kio ĉi-tiu fabriko facile povas konkuri kun aliaj samspecaj institucioj de la tuta Eŭropo. Pro multekosteco de la elektro, oni laboradas ankoraŭ per la vapormaŝino, kiu uzas ĉiutage dek tunojn da karbo. Mezkvante estas forlaborata dudek-kvino da tunoj da greno ĉiuhore. La greno estas alportata per specialaj veturiloj de el la ŝipo al la fabrikejo. Tiu kvanto estus sufiĉa por provizi la tutan popolon de la urbo Antwerpen je la ĉiutaga pano. Oni laboradas tage kaj nokte.

Poste la direktoro klarigis kiel oni prilaboras la grenon en farunon. Tiuj-ĉi klarigoj estas donitaj en la oficejo mem, ĉar en la fabrikejo regas tro multe da bruoj de la maŝinoj por taŭge klarigi. Poste oni dividis nin en du grupojn : unu sub la gvido de la direktoro, la alia sub la gvido de laborĉefo. Sur la korto alveturadas, je greno ŝarĝitaj aŭtomobiloj, kiuj haltiĝas super krado egalalta kun la tero. Malfermiĝis ŝovfermilo sub la veturilo, la greno malaperis en la profundaĵon de kie ĝi per suĉtuboj estas alportata al la siloj. Unue ni vizitis hejtigejon, poste ni inspektis la diversajn funkciadojn, kiuj purigadas la grenon de la malpuraj produktaĵoj; kiel estas lavata la greno kaj ree sekigata per varmo de 60° Poste, la greno estas senŝeligata kaj fine, post la diversaj prilaboradoj, pulvorigata en puran blankan farunon. Nenie la manoj tuŝas la grenon. Cio estas pesata aŭtomate kaj — sub ŝtata kontrolservo — redonata en ĝusta kvanto da forlaborita greno en Kg. Fervojo estas tie ĉi por plifaciligi ŝarĝadon de la vagonoj. Post vizito al la maŝinejo, kie ni rimarkis fortajn maŝinegojn havantajn ĝis 550 ĉ.p., ni adiaŭdiris al la afabla direktoro en lia oficejo kaj ni foriris post kora kaj inda dankvorto.

Samtempe ĉi-tie ni ŝuldas dankvorton al la « Vlaamsche Toeristenbond », kiu donis al ni la okazon admiri ĉi tiun interesan institucion.

Jeva.

Diversaĵoj

La Sud-Manĉuria Fervoja Kompanio, eldonis ilustritan faldprospekton kun informoj por la turistoj, kiuj intencas vojaĝi en Manĉukuo.

La prospekto estas havebla ĉe suprenomita kompanio (S.M.R.) en Dairen, Sud-Mandĉurio. Se la intereso pri tiu gvidilo estos konsiderinde granda, ĝi daŭrigos publikigadon de diversaj Esperantaj gvidlibroj.

* * *

« Flandra Katoliko » aperas nun en nova pliampleksigita formo. Al sia nova kolego, « Flandra Esperantisto » prezentas deziraĵojn de prospero, por la plej granda bono de Esperanto en Flandrujo. Interesuloj pri ĝi sin direktu al S-ano J. Van Deun, Turnhoutsche baan, 277, Borgerhout.

* * *

Aperis Esperanta Gramatiketo por Ladinoj en Friullando, kompilita de Dro. A. Tellin, L. K. Ĉu tio signifas ke en la granda Italujo ankaŭ ekestas lingva grupo kiu deziras sin movi memstare en Esperantujo ?

Atingis nin « Herezulo », sendependa revuo por batalado kontraŭ ĉiaj dogmoj. En ĝi ni legas komparon inter la prezo en minutoj de laboro por diversaj varoj en Moskvo kaj en Parizo, komence de oktobro 1935.

Al manlaboristo en Parizo kostas tritika pano 24 minutojn kaj freŝa haringo 45 minutojn.

Al manlaboristo en Moskvo, kostas tritika pano 172 minutojn kaj peklita haringo 480 minutojn.

* * *

RADIO

ATENTU ! La 8-an de Januaro, le ĉefaj stacioj elsendos la mondkonatan opereton « Pola Sango » (Polenbloed).

La disaŭdigo de tiu opereto, tute en Esperanto, estas tre notinda okazintaĵo en nia movado.

Ĉiuj havas la devon aŭskulti kaj poste danki la sendstacion.

ESPERANTO EN SVEDUJO

En la Svedaj studrondoj la intereso por Esperanto montriĝas ĉiam kreskanta. En la A. B. F. (Kleriga Asocio por Laboristoj) kiu grupigas 5.793 rondojn kun 76.809 anoj, Esperanto okupas la 3-an vicon en la tentabelo. La sekvanta listo montras la 20 ĉefajn studtemojn. Komparu la lokojn kiujn okupas la diversaj lingvoj.

Temo :	Nombro de rondoj		Nombro de studrondanoj
	1934	1935	
Scio pri societa vivo prez. sekr.			
kas. taskoj	956	949	12,028
Scio pri ŝtataj kaj komunumaj aferoj	518	557	5,895
Esperanto	492	538	6,794
Angla ligvo	456	438	6,002
Librotenado	370	290	3,954
Sveda gramatiko	339	349	3,681
Amatora teatro	328	318	4,367
Kanto kaj muziko	297	257	5,298
Matematiko	285	302	3,275
Scio pri sindikatoj	226	275	2,867
Socialismo	172	188	2,234
Beletristiko kaj literatura historio	160	178	1,969

Socia ekonomio kaj nutraja geografio	138	180	1,513
Germana Lingvo	108	127	1,283
Historio de laborista movado	104	100	1,257
Virina kaj vira slojdo	99	104	1,329
Gimnastiko	83	92	2,078
Parolarto kaj belfrazkonstruo	70	66	725
Malsanflogado kaj seksa higieno	50	36	1,923
Sindikalismo	48	88	577

Nekrologo.

Mortis la 29an de novembro 1935, en Oostende, Sro Marcel Cabooter, frato de nia Samideanino Fino. Rachel Cabooter, el Oostende. Niajn sincerajn kondolencojn.

Prilingva demando

Demando de Sro K. el Br. : Ĉu oni povas fari, pere de la sufikso ET, vorton, kiu havas la signifon de « malgrandajo » ?

Respondo : En Esperanto, la vortfarado estas tute libera kaj oni povas, — teorie, — formi novajn vortojn el kiu ajn radiko, afikso, memstara vorto, kondiĉe ke la tiamaniere formita vorto havu sencon logikan kaj klaran. Konsekvence, en la praktiko ne estas eble formi novajn vortojn laŭplaĉe ; per la vortetoj PUR kaj AR, ni povus formi la vorton: PURARO, sed... kio estas ĝia signifo ? Sed per la vorto PUR kaj IG, ni formas logikan, bone kompreneblan vorton : PURIGI.

Do, se ni esploras la sufikson ET en kunmetado de la aliaj afiksoj, ni konstatas ke ni povas formi la vortojn : ETA, ETE, TREETA, TREETE, ETECE, ETULO, ETULINO, ETAJO, k. t. p. sed ETERO, ETO, ETERAJO, nenion signifus.

Konkludo : La sufikso ET povas esti uzata kun adjektivaj, substantivaj kaj verbaj radikoj, kiuj povas ricevi gradan aliigon. Ĝi montras do malpligrandigon, malplifortigon kaj eĉ malplidolĝigon de la ideo.

Adjektivaj radikoj : beleta, varmeta, moleta, ktp.

Substantivaj radikoj : hundeto, korpeto, vireto, ktp.

Verbaj radikoj : rideti, trinketi, videti, ktp.

N. B. ETERO ekzistas kiel radikvorto.

La Redakcio.

Bibliografio

(Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias. Verkoj, senditaj al aliaj adresoj ol Redakcio, Administranto aŭ Flandra Esperanto-Instituto estos ignorataj.)

LA HOMAJ RASOJ DE LA MONDO, de Rolf Norderstreng, 212 paĝ. 140 bildoj. Eld. Soc. Esperanto, Stockholm. Prezo sved. kr. 3,25 broŝ., 4.75 bind.

Dum la Stockholma kongreso 1934 prelegis en la Somera Univer-

sitato Dro Rolf Norderstreng, sveda sciencisto, pri la rasoj de la sveda popolo. Dro Norderstreng jam en la 1890-aj jaroj okupis sin pri Esperanto sed pro siaj sciencaj studoj kaj laboroj li ne trovis tempon por Esperanto. Nun li denove komencis uzi Esperanton buŝe kaj skribe kaj post la Stokholma kongreso li verkis libron pri la temo « La homaj rasoj de la mondo », temo kiun li tre multe studis kaj kiun li pritraktis en kelkaj libroj svedlingvaj pli frue verkitaj.

La verkinto ĝisfunde studis la problemojn, kiujn li pritraktas, kaj li sin apogas sur la lastaj rezultoj de la scienco tutmonda. Liaj vastaj konoj lingvaj multe helpas al li, precipe kiam li verkas en Esperanto pri temo preskaŭ tute nova en tiu lingvo. Estante sendependa sciencisto li havas proprajn opiniojn, kiujn li brave defendas.

Esperantistoj, kompreneble, devas interesiĝi pri fremdaj homoj, popoloj kaj rasoj. Sed kiom ni scias pri la homaj rasoj? Ne multon. Ni false kredas, ke la loĝantaro de lando apartenas al nur unu raso, sed rase puraj popoloj ne ekzistas. Ankaŭ ne ekzistas, laŭ D-ro Norderstreng, superaj kaj malsuperaj rasoj — la eksteraj karakteroj ne donas al iu aŭ iuj rasoj ian pli altan lokon. La aŭtoro pritraktas la rasan demandon justece, li ne rigardas la homajn rasojn el la vidpunkto de blankulo sed de tutmondulo. La superstiĉon tro oftan en rasaj problemoj li akre atakas, celante la purigon de la rasa scienco por el ĝi fari noblan helpilon al politiko tutmonda.

Kio estas rasa biologio? La aŭtoro respondas: Rasa biologio estas la scienco pri la diversaj specialaj tipoj heredaj de unu sama speco besta aŭ planta. Ordinare oni tamen uzas la vorton rasbiologio pri la homo kaj ĝiaj rasoj.

La libro estas varma pledo por amikeco inter la rasoj malsamaj — celo kiun devas plene subteni ĉiu esperantisto. Tial la esperantistoj ankaŭ legos kun intereso la libron, kiu estas bonvena pliriĝo de nia tro malriĉa popularscienca literaturo.

Grupa Vivo

ANTWERPEN. — FLANDREMA GRUPO ESPERANTISTA.

Dum la lasta monato de la jaro, nia grupo sin speciale okupis pri la aranĝoj por la Kristnaska festo. Pri ĝia sukceso ni estas certaj; en la sekvonta numero de la Revuo aperos detala raporto.

La 11an de Januaro, nia grupo denove festos. Agrabla germana kantvespero estos organizata kun la kunlaboro de la mondfama Trio Stenzel el Germanujo. Tiu-ĉi festo okazos en la festsalono « De Ton » Pelikaanstraat, kaj komencos je la 8a akurate. Post la koncerto okazos balo por la gedancemuloj. La geamikoj de kanto kaj danco venos multnombre al nia unua festo de la nova jaro. La amuzo certe ne mankos.

BRUSSEL. — N. E. L. E.

Nia grupo bonege propagandas por la okazonta Ĉseh-kurso. Artikoloj kaj komunikoj pri Esperanto aperis en la loka gazetaro, nia helpema liga prezidanto paroladis en pluraj Bruselaj medioj, cir-

kuleroj estas grandkvante disdonitaj dum kiam belaj afiŝoj grandformataj ĉie en la urbo anoncis la kurson.

Ni faris nian devon kaj esperplene atendas la baldaŭan komencon tuĵ post alveno de s-ano J. Ornstein, la kursgvidanto.

En Bruselo estas definitive starigita, laŭ iniciato de s-ano F. W. Beunting. Cseh-instruisto el Batavio, « Esperantista Reprezentantaro Brusela » Al ĝi aliĝis oficiale 6 E-organizoj Bruselaj, inter kiuj N. E. L. E.

EDEGEM. — NIA IDEALO.

Post grandega propagando kaj senlaca laboro, la grupo aranĝis esperantan kurson en la lernejo de la vilaĝo. Alvenis dek-sep gelerantoj, kiuj ĉiuj plenfervore ekkomencis la studadon de nia ŝatata lingvo. Kiam, je la komenco de la kurso, la prezidanto sciigis al ili, ke interalie estus gajnota senpaga vojaĝo al Londono kun tiea restado dum unu semajno, por ĉiuj membroj kiuj antaŭ la 1a de Novembro 1935 ne lernis la ligvon, ili multe ĝojis kaj decidis fari tiel bone kiel eble plej.

La bona amiko Cyril Bingham el Londono, kiu tiun-ĉi jaron nian grupon vizitis kaj tiom ĝojis pro la amika akcepto, promesis la supran premion sub plenumotaj kondiĉoj. Al li ni ŝuldas la plej grandan dankon.

La kunvenoj nun ne plu regule okazas ĉar la pritraktotaj aferoj povos esti aranĝataj dum venonta speciala kunveno.

RONSE. « LA PACA STELO ».

Telegramstilo mi raportos pri nia novembra monato, kiu estis por multaj gemembroj ĝojoplena monato, rilate la aktivecon, kaj la rezultatoj ne atendigis longtempe, ĉar niaj 2 kursoj komencis kun 17 personoj. Bonan efikon ni atingis per nia maldolĉa propagando en la tuta urbo per niaj flugfolioj kaj dankon publikan mi eldiras ĉi-tie al tiuj samideanoj, kiuj tiel oferdone kunhelpis. Niaj afiŝoj haltigis multajn geurbanojn. Unuvorte ; ĝi estis la plej grava verda monato, kiun Ronse iam travivis.

Pri la festeno : Kion diri? 35 gesamideanoj partoprenis al ĝi, ĉiuj bone manĝis (kompreneble, estis senpage) amuzis sin kaj dancis ĝis la... mi preskaŭ ne kuraĝas diri, je danĝero doni al aliaj grupoj malbonan ekzemplon ; ĉiuj ankoraŭ, eble pli bone trinke- tis? precipe al tia speciala bufedo..., nu, « fino bona, ĉio bona », jen la ĉefpunkto!!

Niaj membroj ne forgesis la Instituton, ĉar por la momento ni aĉetis, ĉiu individue por almenaŭ 20 Fr. po persono, Entute ni esperas atingi alaĉeton de 400 ĝis 500 Fr.

Jen malgranda raporto pri nia novembra monato.

« 1936 » Nova jaro, nova espero, nova kuraĝo. Por tiu jaro, al ĉiu membro ni bondeziras ĉion kaj ni ekkomencas tiun-ĉi monaton per kantvespero, poste, la 15an, (merkredon) ĝenerala deviga kunveno kaj por fini, gravan temon : F-ino Vandercoilden prelegos pri la vivo de Dro Zamenhof.

Lasta avizo : La komitato de la 7a Flandra Kongreso esperas enskribi en tiu-ĉi monato, almenaŭ 10 kotizajojn de gepartoprenontoj.

Geamikoj, ĝis la proksima monato.

La angulo de la serĉemuloj

Ni komencas en tiu-ĉi numero novan rubrikon, por tiuj kiuj ŝatas krucvortenigmojn kaj aliajn serĉotaĵojn. Al la ensendinto de la plej bonaj solvoj, ni promesas belan premion. Ĉiu solvita vorto valoras por 1 poento. Le premio estos do por tiu, kiu akiros la plej altan nombron da trovitaj vortoj.

La solvoj estu ensendataj antaŭ la 5a de Februaro rekte al Sro. F. Volders — Bredastraat 94 — Antwerpen. Bonan ŝancon!

KRUCVORTENIGMO.

(La litero « R » post la klariga vorto signifas, ke oni prenu nur la radikon de la demandata vorto).

HORIZONTALALE

1						5					9
	10				11	12				18	
13	14	15		16		17				22	
19		20	21					26			
23			24	25			29				
	27		28			31					
	30										
32	33				34	35				36	
37	38			39		40	41			42	
43			44			45	46				
47		48					49	50			
	51					52		53			
54						55					

1) igas vivi. 5) antaŭa-
ĉeti la tutan provizon
(R). 10) manĝaĵo. 12)
faro. 13) senpage (mal-
long). 15) frukto. 18)
laŭdire (mall.). 19) ad-
verbo montra. 21) ludi-
lo. 22) religiema. 23) ter-
labori. 25) malplori (R).
26) dikhaŭta besto (R).
27) marŝo. 29) enuigi
(R). 30) ĥemia produk-
to 31) spico (R). 33)
pronomo nedifina 35)
birdo (R). 37) parto de
diametro (R). 39) pre-
pozicio. 41) prepozicio.
43) inklino 44) ne multe

(R). 46) adj. ord. numeralo. 47) prepozicio. 48) lando en Eŭropo.
50) partecipa sufikso. 51) prepozicio. 52) marŝo. 54) buŝa raporto
(R). 55) eksenti (R).

VERTIKALE.

1) loka prepozicio. 2) prepozicio. 3) Biblia nomo. 4) dormbruo
(R). 6) monkesto. 7) kiel 12 Hor. 8) kiel 47 Hor. 9) nuna laboro
de Flandrema Grupo (R). 11) fiŝo (R). 14) frukto (R). 16) viv-
gaso (R). 17) voĉo (R). 18) muzikinstrumento (R). 20) periodo. 22)
doloriga malsano. 24) akra moko (R). 26) pentrilo (R). 28) tiu
(anagramo). 29) originala modelo (R). 32) antaŭarangĝi (R).
34) estis belega en la Brusela ekspozicio (R). 36) bonvolemulo (R).
38) plej malnova ludo. 39) estis Adamo en la komenco (R). 40)
pastra laboro (R). 42) kiel 46 Hor. 44) parto de Azio. 45) dikt'
(anagramo). 48) kiel 52 Hor. 49) sen gepatroj (R). 51) tutkore
(mall.) 53) kompara konjunkcio.

FLANDRA LIGO ESPERANTISTA **(Vlaamsche Esperantisten - Bond)**

Voorzitter: H. Rainson, Hombeeksche steenweg, 54, Mechelen.
Ondervoorzitter: E. Cortvriendt, P. Van Humbeekstraat, 3, Brussel-West.
Sekretaris: Gerard Debrouwere, Magdalenastraat, 29, Kortrijk.
Penningmeester: Bernard Bassleer, St. Rochuslaan, 93, Kortrijk.
Propaganda: Gerard Lenaers, Willemstraat, Hamme.
Postcheck: Flandra Ligo Esperantista, Kortrijk, nr. 2321.50.
Orgaan: « Flandra Esperantisto », maandblad.
Lidmaatschap (met maandblad): 20 fr. per jaar.

Aangesloten groepen:

Aalst: « Pioniro », lokaal: « De Koornbloem », Grote Markt; vergaderingen elken Woensdag avond.
Aarschot: « La Progreso », lokaal « Vlaamsch Huis », Deertschestraat; vergaderingen elken Zaterdag avond.
Antwerpen: « Flandrema Grupo Esperantista », lokaal « De Nieuwe Carnot », Carnotstraat, 70, vergaderingen elken Woensdag avond.
« La Rekta Vojo »; lokaal « De Gulden Kroon », St. Jacobsmarkt, 98; vergaderingen Donderdags om de 14 dagen.
Brugge: « Katolika Junulara Esperanto Grupo », Oude Gentweg, 3.
Brussel: « Nia estas la Estonteco » (N.E.L.E.); lokaal « Breughel », Em. Jacquemainlaan, 37; vergaderingen elken Dinsdag avond.
Edegem: « Nia Idealo », Drie Eikenstraat, 665.
Hamme: « Juna Flandrujo »; lokaal « Jong Vlaanderen », Kapelstraat, 5; vergaderingen elken Woensdag avond.
Kortrijk: « Esperantista Grupo »; lokaal « In den Tuin », IJzerweglaan, 5; vergaderingen elken Woensdag avond.
Lede: « La Esperanta Stelo »; sekretariaat: Krommenellenboog, 60. Lede.
Leuven: « Nova Tagiĝo »; sekretariaat: Tienschestraat, 106.
Lichtervelde: Sekretariaat, Weststraat, 47.
Mechelen: « La Estonto », vergadering elken Vrijdag te 20 uur, Hombeeksche steenweg, 54.
Oostende: « Esperantista Grupo »; sekretariaat: Lijndraaiersstraat, 48.
Oudenaarde: « Al Paco »; sekretariaat: Nederstraat, 8.
Roeselare: « Ruselara Grupo Esperantista »; Statedreef, 177.
St. Niklaas: « Al Triumfo »; sekretariaat: Wegvoeringstraat, 73.

Alle inlichtingen verstrekken verder te:

Diksmuide: M. Maelberg, Wilgenwijk, 28.
Gent: Juliette Terrijn, Raapstraat, 82.
Harelbeke: A. Doornaert, Stasegemstraat.
Hoboken: J. de Groot Caronstraat, 31.
Meenen: K. Depypere, Kortrijkstraat, 160.
Millen (Tongeren): L. Geukens, Langstraat.
Mortsel: H. Van Durme, Eggestraat, 21.
Ronse: « La Paca Stelo », lokaal « Concordia », Statiestraat.
Thielt: R. Plettinck, Kromwalstraat, 24-c.

OSTENDO

HOTELO METROPOLE

Kerkstraat, 32

75 komfortaj ĉambroj kun fluanta akvo, varma kaj malvarma. Centra hejtado. Lifto. Aŭtomobilejo. Kuirejo kaj kelo bonreputaciaj.

MODERAJ PREZOJ

S-ano Snykers havas la plej bonajn rekomendojn kaj persone direktadas.

« BREUGHEL »

SPIJS- en DRANKHUIS

Em. Jacquainlaan, 37, Brussel

Lekkere Dranken

Fame konata pro siaj bongustaj kaj malmultekostaj manĝoj

Ejo de N. E. L. E.

(Brusela grupo Esperantista)



Varbu Abonantojn kaj Anoncantojn !

Speciale rekomendita Restoracio

„ La Renommée ”

St. Baafsplaats, 3 — GENT — Tel. : 120.12

apud la Belfrido.

Estro VAN DER PLANCKEN persone direktas la kuirejon kaj prizorgos la festenon kaj lundan tagmanĝon de la

7a FLANDRA ESPERANTISTA KONGRESO

Huis aanbevolen door V. T. B.

« Presejo de l' Centro », Kipdorpevest, 26, Antwerpen.